Kurt, kiu pro siaj profesiaj kontaktoj sciis, kiujn eldonejojn valoras alparoli. Kaj li tuj sukcesis. La stabo de la eldonejo Edition Atelier senhezite kaj eĉ iom entuziasme akceptis la proponon. (...) Hodiaŭ literaturemaj fakuloj jam tre scivole atendas la aperon de Turmstraße 4, kaj tre certe ĝi meritas kaj ricevos atenton. La nombro de la antaŭmendoj estas tre ĝojiga kaj la ĝisnunaj reagoj de la publiko al diversaj anoncoj senescepte favoraj. (...) Dum miaj ĝis nun 27 jaroj kiel deĵoranto en la Esperanto-muzeo en Vieno mi konfrontiĝis kun multaj antaŭjuĝoj kontraŭ planlingvoj kaj lingvoj entute. Mi ĝojas pri la – esperinde multnombraj – ebloj korekti aŭ almenaŭ kontraŭargumenti la plej drastajn malĝustajn imagojn pri Esperanto. Kaj tio sen blinda fervoro aŭ zelotismo, ĉar, kiel la multjara direktoro de niaj biblioteko kaj muzeo, Herbert Mayer, kutime diris: Por varbi pri Esperanto oni ne bezonas propagandi, sufiĉas rakonti pri ĝi.”

La 21-an de septembro okazis en Vieno libroprezentado en Verein für Geschichte der ArbeiterInnenbewegung (asocio por la historio de la laborista movado). Estas la dua fojo – post Julio Baghy: Hurra für nichts, Innsbruck: Mair, 1933 –, ke en Aŭstrio renoma eldonejo aperigas libron originale verkitan en Esperanto kaj poste tradukitan en la germanan.

Kurt Lhotzky faris intervjuon kun la eldonistoj Jorghi Poll kaj Sarah Legler.

Kio konvinkis renomman literatureldonejon riski la entreprenon kaj publikigi la tradukon de apenaŭ konata romano el Esperanto?

Apude nuntempan literaturon ni havas en Edition Atelier duan fokuson: Aŭstrian literaturon de la 20-a jarcento. Same kiel rilate al la samtempularo ni ĝojas, se ni malkovras nekonatajn kaj (re)faras ĝin alirebla. La laborista literaturo – se oni povas nomi ĝin tiel ĝeneraliga – estis neglektita de la burĝa literaturkritiko. Tio estas bedaŭrinda, ne nur laŭkvalite, sed ankaŭ sub la aspekto de socipolitika signifo kaŝiĝas multaj trezoroj. Precipe la Viena verkisto Hans Weinhengst, de kiu neniam aperis germanlingva libro, ĝis Christian Cimpa tradukis *Turstrato 4* kaj la librovendisto Kurt Lhotzky prezentis ĝin al ni. Se tiom engaĝiĝinta librovendisto proponas ion, memkompreneble oni rigardas tre atente kaj se la libro estas tiom grandioza, oni ne bezonas pripensi longe.

Edition Atelier multe kontribuis al la alireblo de verkintoj de la 1920-aj kaj 1930-aj jaroj: Else Feldmann, Robert Neumann, antaŭ nelonge al la brila „Marilyn“ de Arthur Rundt. Kielmaniere Hans Weinhengst enviciĝas?

Multajn de tiuj ĉi verkistoj oni ne rajtas forgesi, ĉar ili ankaŭ nuntempe povas rakonti al ni nekredablajn gravajn aferojn. Hans Weinhengst montras spirretene la situacion, se homoj restas sen helpo de la socio; tiam regis la senlaboreco kaj la malriĉeco en la Granda Depresio, kiu daŭris en Aŭstrio ĝis ĉirkaŭ 1937 kaj kontraŭ tiu ĉi situacio ankaŭ la socialdemokratio estis grandparte senpova – hodiaŭ la novliberalismigita socialdemokratio havas grandajn problemojn kun sia propra sociala celaro, kaj la problemoj de amasa senlaboreco staras en kelkaj jaroj denove antaŭ nia pordo. Ciferecigo, tutmonda transloko de produktado kaj la

teknika evoluo kaŭzas tion, paŝetante kaj la demando, kiam la krizo de kapitalismo – ni nun vivas en mallonga kaj trompa fazo de malstreĉigo – denove revenos abrupte, leviĝas preskaŭ ĉiun tagon. Silentigita estas la fakto, ke la malriĉeco en nia socio hodiaŭ troveblas inter la enmigrantoj. Kaj tie ofte estas la sama situacio, kiun Weinhengst priskribas. Ni inklinas ne rigardi al tio.

La titola paĝo de „Turmstraße 4“ estas treege adekvata. Kiel ĝi estiĝis?

Dankon! Mi havis la ideon de paro sur kruta ŝtuparo, poste mi devis esplori pri la vestaro en tiuj tempo kaj medio. Cetere mi ŝatas labori en miaj ilustraĵoj kun specialaj surfacoj. Ĉi tie videblas paperaj surfacoj je la muroj, kiuj sugestu rompiĝemon, sed ankaŭ peras ion ŝvebantajn; ne paroli pri la multaj eblecoj, kion oni povas asocii kun skribado kaj papero... la malmola sinsekvo de lumo kaj ombro priskribu la kontraston de realeco kaj espero.

Germana Esperanto-Asocio invitas vin al la 3a Luminesk'!

La ĉi-jara silvestra renkontiĝo Luminesk' okazos en Haltern am See. Haltern situas meze de Germanujo en la ĉarma monastera lando apud lago, kiel la nomo jam sugestas. Luminesk' okazos de la 27a de decembro ĝis la 3a de januaro.

Ĉi-jare gastigos nin Gottfried Könzgen-Haus, klerigejo de la katolik-sindikata movado „KAB“. Haltern vi povas bone atingi per la trajno Münster-Essen aŭ per la aŭtoŝoseo A43.

Ni loĝos en komfortaj 2-litaj ĉambroj. Unulitaj ĉambroj estas haveblaj. La salono estas atingebla per lifto.

Dum la 3a Luminesk' atendos vin multfaceta tema programo kun minimume 2 programeroj samtempe. Denove Alfred Schubert organizos la teman programon. Vi povas oferti viajn programerojn al temaprogramo@luminesk.de.

Du ekskursoj gvidos nin al la regiono. Vespere Luminesk' ofertas kulturalan programon kun koncertoj aŭ teatraĵo. Sin anoncis loka grupo kun regionaj kantoj. En amikeca rondo ni festas silvestron kun bufedo kaj balo.

Post la vespera programo Yoshie kaj Dieter Kleemann organizos la ŝatan gufujon kun spiritaĵoj el la tuta mondo. Barbara Brandenburg kompletigas la organizan teamon de Luminesk'.

La reta aliĝilo estas atingebla en la retpaĝo
www.luminesk.de

Kore invitas vin al la ĉi-jara Luminesk Andreas Diemel nome de Germana Esperanto-Asocio. Por pliaj informoj kontaktu la organizantojn per la retadreso demandoj@luminesk.de aŭ ene de Germanujo per la senkosta telefonnumero 0800-3 36 36 36 642.

Tekstaro.com – nova versio

La retejo www.tekstaro.com estas granda kolekto de aŭtentaj Esperantaj tekstoj, en kiuj oni povas serĉi diversajn vortojn, esprimojn, gramatikajn erojn, por kontroli ilian realan uzadon, kaj por fari diversajn analizojn pri la reala lingvo-uzado.

La *Tekstaro 3.1* provizas al la uzantoj plurajn plibonigojn. Al tiu unika korpuso de skriba Esperanto ĵus aldoniĝis gravaj pliaj verkoj de Zamenhof el pluraj periodoj. Modernigo de la interfacio nun permesas la samtempan serĉadon laŭ pluraj serĉesprimoj. Tio donas novajn eblojn por eltrovi, kompari, kaj kontrasti detalojn pri la uzado de Esperanto. Ĉio funkcias pli rapide, kaj la manieroj konstrui kompleksajn serĉesprimojn nun estas pli klara. *Tekstaro.com* enhavas la plej grandan alireblan korpuson de skribita Esperanto kaj estas inter la plej gravaj projektoj, kiujn ESF komisiis. Uzantoj povas enketi pri la leksiko, de unuopaj morfemoj ĝis plurvortaj esprimoj kaj parolturnoj, kaj esplori simile detale pri la gramatiko. En la planoj por plia evoluo de *Tekstaro* estas morfologia markado de la korpuso: t.e., aldono de „signetoj“ al la jam ekzistantaj tekstoj, tiel ke en serĉado oni povu eviti la konfuzon inter, ekzemple, la vortoj ‘per/son/e’ – ‘person/e’, ‘per/fid/e’ – ‘perfid/e’, ktp. La tekstaroj de naciaj lingvoj kutime havas tiajn indikilojn, kaj aldoni ilin al *La Tekstaro de Esperanto* levos la kapablojn kaj la utilon de *Tekstaro* al eĉ pli granda nivelo.

(Novaĵletero de ESF, Ret-Info/Lingvo-Studio,
<http://www.eventoj.hu>)


Pri Zamenhof lia urbo memoras

La 12an de aprilo Bjalistokaj esperantistoj, reprezentantoj de pluraj lernejoj, urbaj aŭtoritatoj kaj estroj de kultur-institucioj renkontiĝis ĉe la Zamenhof-monumento, por omaĝi doktoron Zamenhof, forpasintan antaŭ 100 jaroj. Krom flormetado kaj tradicia komuna foto, la kunvenon gajigis infanoj el loka infanĝardeno, kantantaj en Esperanto, kaj la infana muzikbando Uku-Donaco Bjalistoko, kiu prezentis por la unua fojo *La Esperon* laŭ nova muzika komponaĵo de Lech Mazurek. La renkontiĝo estis bona okazo por danki al la urbaj reprezentantoj subtenadon de Esperanto kaj de ĝia iniciatinto.

(*La Ondo de Esperanto*)

Verko pri Francisko Valdomiro Lorenz

Lorenz (1872-1957) estas aŭtoro de la 1-a lernolibro de Esperanto en la ĉeĥa, kiun li eldonis en la jaro 1890, sed ankaŭ konata lingvisto, poligloto, pedagogo, naturkuracisto kaj, por spiritistoj, grava mediumo. Li naskiĝis en Ĉeĥio kaj krom la studado de fremdaj lingvoj, inkluzive de Volapuko kaj Esperanto, li dediĉis sin al politika, socialdemokrata agado, i.a. kiel redaktoro de partiaj gazetoj. Pro tio minacis al li malliberiĝo kaj trijara soldatservo en la aŭstria-hungaria armeo. Por eviti tion li elmigris en Brazilon. La libro priskribas lian malfacilan vivon, komence kiel ormineja ministro, poste agrikulturisto, instruisto, naturkuracisto. Inter liaj verkoj troviĝas ankaŭ lernolibroj de diversaj lingvoj, vortaroj, tradukoj



de spiritualismaj verkoj ktp. Lorenz estis poligloto, kiu, laŭ atestantoj, scipovis 104 lingvojn, inkluzive de pluraj indianaj, por kiuj li verkis gramatikojn. En la libro estas prezentita ne nur la vivo de Lorenz, sed grandan parton okupas ankaŭ priskribo de lia verkaro. Vlastimil Novobilský: *Francisko Valdomiro Lorenz: atesto pri la vivo kaj verko de eksterordinara homo.*

(Eldonejo de Petro Chrdle

KAVA-PECH, www.kava-pech.cz/esperanto). Pli da informoj pri Lorenz en Vikipedio: https://eo.wikipedia.org/wiki/Francisko_Valdomiro_Lorenz

Francisko_Valdomiro_Lorenz

TEJO partoprenis Internacian Forumon en Rijad (Saŭda Arabio)

Unesko provas kiel eble plej bone elparizigi siajn aranĝojn. Sekve la Ligkomitato de la NROj organizis sian 7an Forumon en oficiala partnereco kun Unesko en Rijado (Saŭda Arabio) de la 3a ĝis la 5a de majo. Ĉar la temo rilatis al la junularo, Universala Esperanto-Asocio sendis du reprezentantojn, membrojn de TEJO, la junulara organizaĵo ligita al UEA. La Forumo estis trilingva: araba, angla kaj franca; plej ofte uziĝis la araba kaj la angla. Kiel ofte en tiaj aranĝoj, la koridoraj konversacioj estis same fruktodonaj kiel la oficialaj rondaj tabloj, ĉar tie eblis atentigi la oficialulojn, oficistojn kaj membrojn de NROj pri la manko de lingvo-egaleco ĉe UN.

(Oficejo por rilatoj kun UN, Universala Esperanto Asocio,
www.esperantoporun.org)

Simpozio memorigis ke malatento al lingvaj diferencoj obstaklas la Celojn por Daŭripova Evoluigo

La Celoj de UN por Daŭripova Evoluigo (CDE) estas mankaj rilate al atento al lingvaj demandoj, ĉefe pro ĝenerala malatento al la konsekvencoj, pozitivaj kaj negativaj, de lingva diverseco. Tiel asertis la Provizoraj Konkludoj de simpozio, organizita de la Studo-Grupo pri Lingvo kaj Unuiĝintaj Nacioj, kun subteno de Universala Esperanto-Asocio kaj aliaj organizaĵoj. Pli ol cent universitatanoj, diplomatoj, UN-oficistoj kaj reprezentantoj de neregistaraj organizaĵoj (NROj) ĉeestis la simpozion ĉe 777 United Nations Plaza, Novjorko, la 11-an kaj 12-an de majo. Ĝia celo estis ekzameni demandojn pri lingvoj kaj vundeblaj homgrupoj kaj ilia centreco en la disvolvo, realigo kaj sukcesa kompletigo de la CDE. La simpozion aŭspiciis pluraj organizaĵoj, inkluzive de Universala Esperanto-Asocio. Subvenciis CAL kaj ESF. Lokaj esperantistoj kiuj helpis en la organizado inkluzivis Ulrich Becker, Michael Brandini, Raul Garcia, Sofiya Soskina, and Allison Thorsen. Fina simpozia raporto aperos baldaŭ.

(Oficejo por rilatoj kun UN, Universala Esperanto Asocio,
www.esperantoporun.org)

Slovaka ambasadoro raportis pri lingvopolitika deklaro emfazante la bezonon de lingva justeco kaj nediskriminacio

Ĉeestante la Simpozion pri Lingvo, la Celoj por Daŭripova Evoluigo kaj Vundeblaj Homgrupoj, organizita sub aŭspicio de Universala Esperanto-Asocio, Richard Galbavý, Vica Konstanta Reprezentanto de Slovakio ĉe Unuiĝintaj Nacioj, raportis pri la Deklaracio de Nitra pri lingvopolitiko, akceptita de la kvarlanda grupo Višegrad (Ĉeĥio, Hungario, Pollando, Slovakio) ĉe sia konferenco en Nitro, Slovakio, pasintan julion. La konferenco estis fiksita por koincidi kun la 101-a Universala Kongreso de Esperanto, samtempe okazanta en Nitro. La deklaro traktis tri ĉefajn temojn: Engaĝiĝon de civitanoj, Multlingvismon en la ekonomio kaj la socio kaj Edukan inkludon. La Deklaracio emfazis la bezonon „kreskigi publikan konscion pri la graveco de lingvopolitiko“ kaj „lanĉi dialogon inter ŝlosilaj interesatoj pri lingvopolitika laboro.“ „La konkludoj de la konferenco de Nitro,“ aldonis Ambasadoro Galbavý, „konsistigas malgrandan, sed konstruan kontribuon fare de Slovakio kaj la Višegrad-landoj al la daŭranta diskutado de la estonteco de Eŭropo, kiu celas fortigi lingvan justecon kaj demokration, farante eŭropan integriĝon signifplena por ĝiaj civitanoj.“

(Oficejo por rilatoj kun UN, Universala Esperanto Asocio, www.esperantoporun.org)

Ĉinio: eldoniĝis lernolibro Bazo de Esperanto

En majo 2017 en la Zaozhuang-a Universitato okazis la kunveno pri la lernolibro *Bazo de Esperanto*. La libro estas kompilita de s-ro Semio, vicĝenerala sekretario de ĈEL kaj respondeculo de la Esperanto-Muzeo en la Zaozhuang-a Universitato kaj s-ino Li Hui, instruistino de la universitato. La libro konsistas el 15 lecionoj kaj enhavas pli ol 600 vortojn pri komerco, turismo, interreto, historio, literaturo, medicino kaj aliaj kampoj. Ĝin eldonis la Eldonejo de la Shandong-a Universitato. Prezidis la kunvenon prof. d-ro Bak Giwan, fama korea esperantisto, kiu nun instruas en la Zaozhuang-a Universitato. Prof. d-ro Sasaki Teruhiro, eksa prezidanto de KAEM, alte taksis la lernolibron kaj la Esperanto-movadon en la universitato.

(Sun Mingxiao, <http://esperanto.china.org.cn/>)

Varsovia konferenco omaĝe al la centa mortodatreveno de Zamenhof

Instituto pri kulturo „Mazowiecki“ en Varsovio gastigis tritagan konferencon por honori la memoron pri la mortodatreveno de Zamenhof inter la 28a kaj 30a de aprilo. La konferenco aŭspiciis Ministerio pri kulturo de Pollando kaj Komisiono pri Unesko de Pollando. Inter multaj prelegintoj estis ankaŭ Spomenka Ŝtimec (aŭspiciita de Ministerio

pri kulturo de Kroatio.) Aparte kortuŝa estis la vizito kaj la programo antaŭ la Muzeo de la Juda Kulturo POLIN, kiu prezentas miljaran historion de la polaj judoj. POLIN akceptis la kroatan proponon, ke kadre de la programo estu legataj fragmentoj el la libro „Zamenhof-Strato“ de pola aŭtoro Roman Dobrzinsky. La partoprenintoj de la programo legis el la libro antaŭ la muzeo POLIN en la pola, Esperanto, franca, germana, hungara, ĉeĥa kaj kroata. El ĉiuj pogrameroj speciale kortuŝa estis la vizito al la tombo de Lazaro Ludoviko Zamenhof kaj la kultura programo ĉe la tombo. Mirindas la varsovia juda tombejo, la plej granda juda tombejo en la mondo. Post la pereco de tri milionoj da polaj judoj restis nur malmultaj homoj por flegi ĝin. Roman Dobrzynski rakontis pri la historio de la sarkofaga monumento por Zamenhof.

(Spomenka Ŝtimec, *Eŭropa Bulteno*: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>)

Manuel de Seabra forpasis

Ernesto Manuel de Seabra Ferreira Bértolo naskiĝis la 7an de julio 1932 en Lisbono, iĝis verkisto kaj tradukisto en la lingvoj portugala kaj kataluna, kaj estis prezidanto de la Kataluna Verkista Asocio ekde 1999. Li lernis Esperanton kiel lerneĵano en 1946. En 1959 li redaktis *Antologion de portugalaĵoj rakontoj* kaj reaktiviĝis literature meze de la 1990aj jaroj, kiam li membriĝis en la Esperanta PEN-Centro kaj ekverkis originale en Esperanto. Inter liaj libroformaj Esperanto-verkoj estas kvar romanoj (*La armeoj de Paluzie* (1996); *La tago kiam Jesuo perfidis Judason* (2001); *Ĉu vi konas Blaise Cendrars?* (2007); *Malamu vin, unu la alian* (2009), originala novelaro *Promeso en obskuro* (1997) kaj eseo *Ĉu nur unu civilizacio* (2007). Li ankaŭ tradukis en Esperanton la poemaron *Musono* (2000) de sia edzino Teresa de Almeida, kiu verkis kun la pseŭdonimo Vimala Devi.

(La Balta Ondo <http://sezonoj.ru/>)

Estrara Raporto pri la agado de UEA en 2016

La lasta jaro vidis la komencon de signifaj ŝanĝoj en UEA – ŝanĝoj en la personaro, en la strategio kaj en la bazaj dokumentoj kaj strukturoj de la Asocio. Per Ĝenerala Voĉdono, fine de la jaro, la membraro aprobis aron da ŝanĝoj en la Statuto, inkluzive de la jura memstarigo de TEJO kaj la ebligo de perreta voĉdonado. Nova Ĝenerala Direktoro eklaboris por plivastigi la Volontulan Servon en la Centra Oficejo, kaj tion la Estraro subtenis per aĉeto de Volontula Domo en Roterdamo. La elektoj en Nitro daŭrigis la oficon de la Prezidanto, Vicprezidanto kaj Ĝenerala Sekretario, sed ankaŭ alportis du freŝajn anojn al la Estrara teamo. Ne ĉio estis pozitiva – la jaro alportis signifan deficiton, kune kun reŝrumpo de la membraro post portempa kresko en 2015. La tuta 27-paĝa Estrara Raporto estas elŝutebla en la retejo de UEA

http://uea.org/lt/teko/komitataj/Estrara_Raporto_2016.pdf

Germanio kaj Ĉinio kunlaboras por eldoni la revuon *Tra la mondo*

En la 1-a numero de *Tra la mondo* la redakcio anoncis, ke la revuo estas senpaga al ĉinaj aktivuloj, ke la reta versio por abonantoj estas 6 eŭroj, kaj la papera versio estas 26 eŭroj jare. Post la apero oni senpage donacis la unuan numeron al ĉiuj legantoj. Ekde nun, Interkultura Centro Herzberg (ICH) el Germanio kaj Esperanto-Centro Ora Ponto decidis kunlabore eldoni la revuon *Tra la mondo*. Post la kunlaboro la du eldonantoj decidis, ke la reta versio estas senpaga al ĉiuj. La reta versio estas senpage havebla ĉe la du centroj. Nur la paper-versiaj bezonantoj pagos la bazan koston. Mondonaco por subvencii la eldonadon estas bonvena. La donaco iru al uea-konto: „huyi-j“ kun indiko „donaco al *Tra la mondo*“.

(Peter Zilvar, Direktoro de Interkultura Centro Herzberg - Trezoro Huang Yinbao, Direktoro de E-Centro Ora Ponto)

Ĉina Radio Internacia invitas al la rubriko „Kampo de Literaturo“

Ekde la unua de aprilo 2017 la Esperanto-redakcio de Ĉina Radio Internacia (ĈRI) havas sian lokon ekskluzive por la nova literatura rubriko Kampo de Literaturo (KL).

Estas bonvenaj ĉiuj esperantistaj verkemuloj kaj traduk-amantoj. Se vi havas iun ajn manuskripton, legindan por la publiko, dividendan por aliaj, ne hezitu sendi ĝin al la skipo de KL. En KL estas diversaj branĉoj por originalo kaj traduko: poemo, novelo, fabelo, rakonto, eseo, recenzo (por rekomendi bonan libron literaturan aŭ dividi vian penson pri ĝi).

(espradio@cri.com.cn, xionglinpingesp@163.com)

Finlernintoj de Duolingo duoble superas UEA-n

Libera Folio raportis pri la sukceso de Duolingo: Fine de majo la suma kvanto de la homoj, kiuj eklernis Esperanton ĉe la retejo Duolingo, superis milionon. Proksimume 5 procentoj el la eklernintoj finas la kurson. Tio signifas, ke la kvanto de finlernintoj nun almenaŭ duoble superas la membrokekvanton de UEA.

La kurso de Esperanto ĉe Duolingo estas pli populara ol tiu de la vjetnama, sed malpli populara ol la kurso de la hebrea. En 2 jaroj la Esperanto-kursoj ĉe la populara lingvolerna retejo Duolingo atingis sume pli ol milionon da eklernintoj. Tio tamen ne signifas, ke miliono da homoj en la nuna momento studas Esperanton ĉe Duolingo, atentigas Lu Wunsch-Rolshoven, kiu akompanas la Duolingo-projektojn jam ekde la komenca fazo: „Temas pri unu miliono da homoj, kiuj komencis la kurson. La nombro de nuntempaj aktivaj lernantoj estas nur eta parto. Antaŭ monatoj venis informo, ke 5.000 lernantoj uzas la kurson ĉiutage. Mi kredas, ke tio estas sufiĉe kutima kvanto por senpaga kurso. Homoj venas, intense lernas, foriras kaj poste iam revenas.“ La tuta artikolo legeblas ĉe

<http://www.liberafolio.org/>

Olga Shiliaeva, nova komisiito pri Scienca kaj Faka Agado de TEJO

Olga Shiliaeva prezentas sin: „Mi estas Olga Shiliaeva, esperantistino el Rusio. Laŭ profesio ekonomiisto kaj instruisto en universitato. En 2012-2014 mi estis komitatano A de TEJO por Rusio, en 2014-2015 – komitatano B. En Esperantujo mi multe okupiĝas pri verkado. Mi estas konstanta kunlaboranto de la revuo *Kontakto*, verkas kontribuojn por *Esperanto* kaj *Beletra Almanako*. Aktiva membro de Ural-Siberia Movado. Mia celo estas per helpo de la Komisiono pri Scienca kaj Faka agado organizi favoran medion en Esperantujo por komunikado kaj ideo-interŝanĝoj inter junaj scienculoj. En 2014 mi gajnis la konkurson „Partoprenu IJK-n“ kaj senpage vojaĝis al IJK-87 en Fortalezo kaj UK-99 en Bonaero. En Jekaterinburgo (2012) kaj Bonaero (2014) mi trapasis KER-ekzamenon, skriban kaj parolan, nivelo C1. Kiel universitata instruisto mi ne povas preteratenti sciencon. Mia celo estas per helpo de la Komisiono pri Scienca kaj Faka agado organizi favoran medion en Esperantujo por komunikado kaj ideo-interŝanĝoj inter junaj scienculoj.“

(<http://tejo.org/>)

Hispanio: Granda murpentraĵo en Cheste, Valencio

Ene de la artisma iniciato „Graffitea“ en Cheste (Valencio), estis pentrita granda murpentraĵo (grafitio) kun teksto en Esperanto omaĝe al la esperantista pioniro Francisco Mániz, en lia iama naskiĝdomo. Pri ĝi zorgis la grupo „Cheko's Art“, el Lecce (Italio), kunlabore kun la esperantista grupo „Lumradio“ de Cheste.

La teksto montras la frazon: „Esperanto, lingvo por la homaro kaj por la paco inter la popoloj de la mondo“.

(<http://esperanto.es/hefl>)

Juncker konfirmas la rezignon pri la angla lingvo

„Mi ĉiam dubas, ĉu paroli la anglan aŭ la francan, sed mi faris mian elekton. Mi prezentos mian paroladon en la franca, ĉar malrapide sed konstante la angla perdas sian gravecon“. La prezidanto de la Eŭropa Komisiono Juncker, komencis tiel sian intervenon pri la stato de la Unio, la 5an de majo 2017 ĉe la Eŭropa Universitata Instituto en Florenco. La elekton pri la franca li motivis ankaŭ per la fakto ke en Francio okazis la baloto por la prezidento de la respubliko. Dufoje ĉe tiu enkonduketo la publiko vigle kaj sincere aplaudis. „Ni intertraktados en absoluta lojaleco kun niaj britaj amikoj, tamen ne la Unio forlasas Briton, sed Britio forlasas la Union: en tio situas la diferenco, kaj tiu diferenco sentiĝos dum la venontaj jaroj“, – deklaris Juncker. Liaj enkondukaj vortoj konformas al la prognozo, ke la angla ne estos plu oficiala lingvo de EU ekde 2020.

(HeKo, „La Ondo de Esperanto“

<http://esperanto-ondo.ru/Ind-ondo.htm>)

Radio Esperanto: ne nur aŭskultebla, sed ankaŭ abonebla

Oni informis, ke la 21an de majo Radio Esperanto, podkasto en la Internacia Lingvo, kompilata kaj registrata en Kaliningrado (Ruslando) ekde februaro 2008 ekhavis sian propran retejon, kie niaj sonprogramoj estas aŭskulteblaj kaj elŝuteblaj: <http://radio.esperanto-ondo.ru/>. La programoj estas ankaŭ aboneblaj. Aldone al la jam anoncita abon-adreso ĵus aldoniĝis alia adreso: <http://feeds.feedburner.com/esperanto-ondo/abonu>. La posedantoj de la populara programo „iTunes“ abonu rekte en la menuero „iTunes Score“ kie en la serĉfenestreto enmetu la vortojn: „Radio Esperanto“.

(La Balta Ondo <http://sezonoj.ru>)

Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj

IKBE83 (Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj) okazis dum la 8-15 de julio 2017 en Sokobanja (Serbio) kaj kolektis ĉirkaŭ 50 partoprenantojn el 13 landoj. Estis prezentitaj kaj pritrakitaj referaĵoj laŭ la ĉefa kongrestemo: „Rolo de ŝatokupoj en la vivo de nevidantoj“. Enkadre de IKBE okazis du ĝeneralaj asembleoj de LIBE. Inter aliaj aranĝoj okazis du ekskursoj, prezento de karateo por blinduloj, ŝakmatĉo inter teamoj de la IKBE kaj blindulorganizaĵo de la urbo Niŝ, rakonto de Jiří Jelínek pri historio de la orgeno en Eŭropo, Serba nacia vespero kaj Arta internacia vespero.

(Anatolij Masenko; <http://www.libe.slikom.info>)

Homrajta breĵiero

UEA eldonis broŝuron kun kolekto de la ĉefaj UN-dokumentoj pri la homaj rajtoj. La kolekton eniris la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj kaj du Internaciaj Paktoj: pri Civilaj kaj Politikaj Rajtoj kaj pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj. La teksto de la Universala Deklaracio estas kanona, ofte publikigata en Esperanto, la tekstoj de la Paktoj estas freŝe kaj modele tradukitaj de Humphrey Tonkin kaj kontrolitaj de Brian Moon. La tekstojn antaŭas antaŭparolo de Mark Fettes kaj enkonduko pri historio kaj nuna stato de la homrajtaj dokumentoj kaj institucioj, verkita de M. R. Urueña. Ĝenerale la broŝuro, kiel facile konsultebla fonto pri la ĉefaj homrajtaj dokumentoj kaj precizaj formuloj, estas tre utila por ĉiu havanto. Ĉi tiu recenzo aperis en la julia numero de *La Ondo de Esperanto*, rete:

La Balta Ondo, <http://sezonoj.ru/2017/06/recenzo-77>

Unesko-Kuriero en Esperanto

Unesko-Kuriero estas la oficiala revuo de Unesko (Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo). Ĝi ekaperis en 1946. Kiel grava komunikilo por disvastigi la ideojn de Unesko kaj promocii la interkulturajn dialogojn, la revuo iam ludis gvidan rolon por disvolvi la misiojn de Unesko en la kampoj, pri kiuj ĝi respondecas. Antaŭ jaroj,

multaj esperantistoj alvokis, ke Unesko eldonu ĝin ankaŭ en Esperanto. Amaso da retaj mesaĝoj bombe ĝenis la funkciulojn de Unesko, kiuj kelkfoje respondis: „se UEA aŭ iu alia pretas financi ĉion, Unesko pretas doni permeson al Esperanta eldono de *Unesko-Kuriero*.“ Bedaŭrinde la revuo devige ĉesis ekde 2012 pro manko de financaj rimedoj. En majo 2017, post reapero de la 76-paĝa plenkolora *Unesko-Kuriero*, UEA tuj lanĉis projekton pri eksperimenta eldono de *Unesko-Kuriero* en Esperanto, laŭ iniciato de la UEA-komitatano Trezoro Huang Yinbao, direktoro de Esperanto-Centro Ora Ponto Ĉinio. Danke al kunlaboro de 36 tradukintoj kaj provlegintoj en 23 landoj, kaj financa subvencio de Esperanto-Centro Ora Ponto Ĉinio, la 1-a numero de *Unesko-Kuriero* en Esperanto estas eldonita. La du versioj en Esperanto estas same aspektaj kiel la UN-lingvaj versioj. La papera versio estos aĉetebla ĉe la Libroservo de UEA. La reta versio estas senpage elŝutebla ĉe UEA-retejo: http://uea.org/pdf/Unesko-Kuriero_1-2017.pdf

(Gazetaraj Komunikoj de UEA, <http://reto.uea.org>)

UEA diplomis ok elstarajn agantojn – i.a. Jonas Marx (Jonny M)

En la Solena Fermo de la 102-a Universala Kongreso en Seulo estis anoncitaj la nomoj de 8 ricevantoj de Diplomo pri Elstara Agado kaj de Diplomo pri Elstara Arta Agado. Jen la ĉi-jaraj distingitoj: Normand Fleury (Kanado), motoro de la kebekia movado dum pli ol tridek jaroj, ĉeforganizanto interalie de la Internacia Junulara Kongreso en 1992 kaj la Tutamerika Kongreso de E-o en 2008. Ronald Glossop (Usono), profesoro pri paco-studoj, dum jardekoj aktiva verkisto kaj preleganto pri la rilatoj inter Esperanto, paco kaj internacia kompreniĝo. Halina Komar (Pollando), elstara aktivulo pri informado, i.a. kadre de la ekonomiaj pintkunvenoj en Krynica, la muzikfestivalo Woodstock, la pola parlamento kaj medioj de la t.n. Tria Aĝo. Jonas Marx (arta, Germanio), majstro de repa muzika stilo en Esperanto, kies koncertoj entuziasmigis junan kaj ankaŭ ne tiel junan publikon. Germain Pirlot (Belgio), aktivulo pri instruado dum multaj jaroj, i.a. efika helpanto por la instruado de Esperanto en Afriko kaj senlaca kompilanto de registro de E-kursoj tutmonde. Jérémie Sabiyumva (Burundo), talenta motoro de la movado en Burundo, unu el la plej viglaj landaj movadoj en Afriko, kaj aktiva kunlaboranto pri la tutafrica movado. Eduardo Vivancos (Kanado), instruisto kaj varbanto por la movado dum ok jardekoj, inkluzive de la plej malfacilaj kondiĉoj en malliberejoj kaj koncentrejoj; ankaŭ aktiva en Sennacieca Asocio Tutmonda. Wang Minhao (Ĉinio), multjara motoro de la movado en Ŝanhajo, talenta instruisto kaj ĉeforganizanto de pluraj internaciaj kongresoj inkluzive de Internacia Fervojista Kongreso en 2015.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA, <http://reto.uea.org>)

La 90-a Kongreso de SAT

La 90-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda okazis inter la 29-a de julio kaj la 5-a de aŭgusto 2017 en Seulo, Sud-Koreio. Ĝi estis la unua SAT-Kongreso en Azio kaj la tria ekstereŭropa. La kongresejo estis hotelo en banloko de

la okcidenta antaŭurbo Gimpo, tutproksime de la bordo de la Flava Maro. Utilis, ke la kongreso, loĝado kaj manĝado okazis en la sama loko. Ho Song estis la prezidanto de la Organiza Kongresa Komitato. Krom la kutimaj laborkunsidoj de la asocio, de la frakcioj kaj fakoj, okazis ankaŭ prelegoj pri Kandela Revolucio (Kang Hongu kaj Amelano Ĵo), Gugla Pasporto (Hiongun Kim), Esperanto-Domo en Kreto (Annie Grente), nuklea akcidento en Fukuŝima kaj poste (Hori Yasuo), antropologio, kartografio kaj koloniismo (Gijermo Fians), korea literaturo (Rob Moerbeek), Esperanto kaj klasikaj lingvoj (Saioa Escobar), korea lingvo (Ho Song), memoro de Esperanto-movado (Xavi Alcalde) ktp. Ekskursoj estis organizitaj al Seulo, Buyeo kaj la insulo Ganghwa (de kie estas vidata Norda Koreio). (<http://reto.uea.org>)

Nova lernilo por arablingvanoj

Ĝus aperis la lernolibro de Stano Marček *Esperanto per rekta metodo* en la araba. Tio kontribuos signife al la laboroj de la Komisiono MONA disvastigi Esperanton tra tiu postrestanta regiono. Specife tio utilis por Maroko, kie okazos la sekva Mezorianta Kunveno kaj Jordano, kie oni en 2019 volas okazigi komunan dupartan eventon, parte en Israelo kaj parte en Jordano. Oni povas mendi ĝin rekte ĉe stano.marcek@gmail.com. Aperas ankaŭ disko, sur kiu estas la lernolibro en pdf + modela elparolo en mp3. Oni do povas vidi la tekstojn kaj bildojn, aŭdi la modelan elparolon kaj imiti ĝin. La lernolibro jam aperis en 40 lingvoj: la angla, franca, itala, rusa, ĉina, japana, korea, portugala, pola, slovaka, Esperanta, greka, nederlanda, irlanda, rumana, germana, dana, litova, serba, vjetnama, luksemburga, hungara, kroata, finna, ĉeĥa, hispana, ukraina, sveda, tajvana, armena, taja, norvega, islanda, indonezia, turka, hinda, bulgara, latina, araba kaj latva.

(<http://www.ipernity.com/home/stano.marcek>)

Nova retgazeto:

Semajno de Enigmoj

Ĝi estas la unua gazeto de enigmoj Esperanta kaj enhavas klasikajn krucvortenigmojn, kriptan kaj silaban krucvortenigmojn, vortoserĉon, rebuson, aliajn vortopuzlojn, novaĵojn, kaj aliajn. Fondinto estas Luca Desiata, ankaŭ ĉefredaktoro de *Hebdomada Aenigmatum* (la unua gazeto de enigmoj latina) kaj de Onomata Kechiasmena (la unua gazeto de enigmoj grekantikva). Ĉefredaktoro de *Semajno de Enigmoj* estas Giorgio Denti, ankaŭ prezidanto de Roma Esperanto-Grupo. La gazeto estas senkosta.

(<http://www.semajnodeenigmoj.com>)

Forpasis Marjorie Boulton (1924-2017)

La 30-an de aŭgusto 2017 forpasis d-ino Marjorie Boulton. Marjorie Boulton doktoriĝis pri literaturscienco en 1948. La postan jaron ŝi lernis Esperanton. Ŝi debutis kiel Esperanta verkisto i.a. en la Belartaj Konkursoj de UEA. En 1958 ŝi estis la unua ricevanto de la Arĝenta Sprono de la eldonejo

Koko. Boulton oficis kiel sekretario de Internacia Somera Universitato, de la Internacia Ekzameno kaj prezidanto de Societo de Britaj Esperanto-Instruistoj. Ekde 1967 ŝi estis membro de la Akademio de Esperanto. En 1998 ŝi ricevis la Esperanto-Kulturpremion de la urbo Aalen, de la FAME-fondaĵo, en 2004 la premion Deguĉi, en 2014 la premion de la Fondaĵo Grabowski. Ekster la Esperanto-movado ŝi estis vaste konata kiel verkinto de didaktikaj libroj pri literaturo. En 1999 aperis, sub la redaktado de Vilmos Benczik, festlibro: *Lingva Arto. Jubilea libro omaĝe al Wiliam Auld kaj Marjorie Boulton*. En 1985 ŝi estis elektita kiel Honora Membro de UEA. (Gazetaraj Komunikoj de UEA, www.uea.org)

Japana komputila ludo instruas Esperanton

En aŭgusto aperis en Japanio nova komputila ludo „Kotonoha Amrilato“, kiu uzas Esperanton: Junulino hazarde trafas al mistera mondo, kie ĉielo estas rozkolora kaj ĉiuj parolas iun strangan lingvon nomatan „juliamo“ (kiu fakte estas Esperanto). Ŝi ne havas alian eblon ol ellerni la lingvon. Dum amuziĝo la ludanto efektive lernas Esperanton. Jen ligo al Esperantlingva informa filmeto pri la ludo en Jutubo: <https://youtu.be/E53WWTL3jHk>. Post iom da ekzercado en la ludo, japanaj esperantistoj eble povas esprimi sian opinion, ĉu havas sencon pensi pri la tradukado de tiu ludo al aliaj lingvoj, skribas Szilvási László. (<http://www.eventoj.hu>)

Esperanto, lingvo ne facila por ĉinoj – kial?

En artikolo de la gazeto *Tra la mondo* skribas Solis Liu Xiaozhe kial Esperanto ne facilas por ĉinoj: „Por ĉinoj, ĉu Esperanto estas pli facila ol aliaj fremdaj lingvoj? Jes, almenaŭ ĝi estas multe pli facila ol la angla. Sed por ĉinoj, ĉu Esperanto estas facila? Ne! Por ĉinoj ĝi ne estas facila lingvo, kaj eĉ oni povas konstati, ke ĝi estas malfacila lingvo. Oni ofte legas, ke eŭropano ekparolas flue en Esperanto post lernado de nur kelkaj monatoj. Sed tia ekzemplo estas sensignifa por ĉinoj. Multaj ĉinaj lernantoj ne kapablas flue paroli Esperante eĉ post lernado dum pli ol 10 jaroj! Kial estas tia afero? Por eŭropanoj Esperanto estas nur varianta de sia gepatra lingvo, sed por ĉinoj ĝi estas tute nova fremda lingvo! La prononco kaj gramatiko estas regulaj, kaj la ne-norma prononco kaj eraroj en la gramatiko fakte ne serioze influas la komunikadon. Por ĉinaj lernantoj la plej malfacila punkto estas la vortoj, la 2500 bazaj vortoj, kiuj estas tute fremdaj por ĉinoj. Sed tio ne estas problemo por eŭropanoj, kiuj konas grandparton de tiuj vortoj sen lernado. Estas klare, ke la kvanto de la vortoj estas obstaklo, kiun ĉinaj lernantoj devas konkeri. Sed estas iom domaĝe, ke eŭropaj esperantistoj ankoraŭ daŭre aldonas novajn vortojn al Esperanto. Forlasinte vortojn longajn, sed facile memoreblajn, eŭropanoj aldonas vortojn mallongajn, sed tute fremdajn por ne-eŭropanoj, ekzemple malrapida kaj lanta, maldiligenta kaj pigra, malnova kaj olda ktp. Tio plimalfaciligas Esperanton, kaj fortimigas la novajn lernantojn, kaj fakte helpas la kontraŭstarantojn de Esperanto. (Solis Liu Xiaozhe)

Pentekoston 2018 ni kongresos en Zweibrücken!

La partoprenintoj de la ĉi-jara Germana Esperanto-Kongreso jam scias: venontan jaron nia kongresurbo estos Zweibrücken – proksima al la franca landlimo kaj ne malproksima al Luksemburgio.



en 1394. La kastelo Zweibrücken estas la plej granda konstruaĵo de Palatinato kaj hodiaŭ sidejo de la supera landa juĝejo. La Eŭropa Rozoĝardeno estas la plej konata vidindaĵo de la urbo. En la pli ol 50.000 m² granda parko kreskas pli ol 60.000 rozoj de pli ol 2.000 diversaj kultivaroj. La parko estas unu el la plej grandaj ĝardenoj de Eŭropo kaj la tria plej granda rozario de la tuta mondo. Ĝin malfermis en la jaro 1914 la princino Hildegard de Bavario. La plezurkastelon Tschifflik konstruigis en 1715 kaj 1716 Stanislaus Leszczyński, reĝo de Pollando kaj grandduko de Litovio (1704-1709 kaj 1733-1736) kiel somerrezidejon. Laŭ liaj ideoj la sveda konstrumajstro J.E. Sundal planis kaj realigis la kastelon, tipan ekzemplon de baroka konstrustilo.

Hodiaŭ en Zweibrücken funkcias filio de la altlernejo Kaiserslautern: iama faka altlernejo kun ĉefe matematikaj-natursciencaj (precipe informadiko) kaj ekonomiaj studdirektoroj. En la moderna konstruaĵo de la altlernejo okazos nia kongreso.

Temo de la kongreso estos „Esperanto – tutmonde ligita“ („Esperanto – global vernetzt“). Ni elektis ĝin, ĉar unuflanke la Esperanto-movado mem estas ekzemplo de bone funkcia tutmonda reto kaj ĉiam havis tutmondan pretendon. Aliflanke ni ĉiuj sentas kiel la hodiaŭa tutmondigo influas ankaŭ la esperantistan komunumon. Vojaĝado kaj kontaktoj kun foraj landoj almenaŭ por eŭropanoj fariĝis pli facilaj, eĉ ĉiutagaj – kaj multaj opinias ke por tio oni ne bezonas komunan lingvon kiel Esperanton. Novaj komunikaj medioj pli faciligas lernadon ankaŭ de nia lingvo (jam miliono laŭdire eklernis Esperanton per „Duolingo“, multaj miloj ekzameniĝis). Vikipedio en Esperanto havas pli da serĉvortoj ol en multaj naciaj lingvoj. La Esperanto-komunumo ŝanĝiĝas: kelkaj el ĝiaj klasikaj eventoj kaj labormetodoj fariĝas malpli altiraj, sed per „Amikumu“ estas facile kontakti samlingvanojn proksime kaj malproksime. Ŝanĝiĝas ankaŭ la interna administrado de niaj asocioj, kaj al presitaj kaj dissenditaj revuoj aldoniĝas retaj. Ni esperas ke en Zweibrücken povos partopreni kelkaj el niaj novaj protagonistoj, kaj ni esperas pri vigla kaj fruktodona diskuto. Unua informilo kun ĉiuj necesaj informoj aperos baldaŭ, kaj intertempe vi povas kontakti la Lokan Kongresan Komitaton per jena adreso: Internacia Esperanto-Klubo Zweibrücken, Postfach 2019, DE-66470 Zweibrücken, retmesaĝo: 95aGEK@esperanto-reto.eu, telefono: +49 6332 981190 aŭ +49 151 25096448, fakso: +49 6332 981192.



Tio donas la ŝancon, ke ankaŭ multaj esperantistoj el niaj najbaraj landoj povu partopreni. Ni antaŭĝojas same pri aliaj eksterlandaj partoprenantoj, por kiuj la kongresurbo en la mezo de Eŭropo estas facile atingebla. La kongreso komenciĝos vendredon, la 18-an de majo 2018, kaj daŭros ĝis lundo, la 21-an. Krom la jarĉefkunveno kaj aliaj organizaj renkontiĝoj estas planataj urbogvidado kaj ekskursoj tra la ĉarma regiono de Palatinato kaj Sarlando, distra vespero, dediĉita al tiu regiono kaj internacia vespero kun muziko kaj artaj prezentoj.

Zweibrücken (Du-Pontoj, franclingve Deux-Ponts) estas eksterdistrikta urbo kaj apartenas al la federacia lando Rejnlando-Palatinato. Fine de oktobro 2016 la urbo havis 32.290 loĝantojn. La graflando Zweibrücken iam estis graflando en la Sankta Romia Imperio. Ĝi ekestis inter 1182 kaj 1190 el hereda parto de la graflando Saarbrücken. Inter 1286 kaj 1302 la grafa familio dividiĝis en 2 liniojn: Zweibrücken-Bitsch kaj Zweibrücken (-Zweibrücken). La pli juna linio kun la burgo kaj la urbo finiĝis



Welt der Bücher und Zeitschriften – Esperanto und andere Plansprachen Aktuelles, Wissens- und Bedenkenswertes aus der Deutschen Esperanto-Bibliothek Aalen

Folge 34 – *Sprache der Wissenschaften: Wissenschafts-Babel – Scientific Babel – Erreichbarkeit der Bibliotheksmitarbeiter*

Gordin, Michael D[an] *1974- *: Scientific Babel : how science was done before and after global English. - Chicago [u.a.] : The Univ. of Chicago Pr., 2015. - 415 S. : graph. Darst. - ISBN 978-0-226- 00029-9 [KLA==501/4] = Wissenschafts-Babel, wie man wissenschaftlich arbeitet, vor und nach dem globalen Englisch.

Der Grund dafür, gerade jetzt über diese Studien zu schreiben (und sie ggf. zur Lektüre zu empfehlen, s.u.) ist nicht der verspätete Einkauf oder Unaufmerksamkeit. Die Existenz des Buchs war bekannt, da die ESF (Esperantic Studies Foundation) schon einige Zeit darauf hingewiesen hatte, www.esperantic.org/en/publications/recent-books/. Klar war, dass es sich um das Thema Wissenschaftssprache handelte und der Historiker Gordin vermutlich auch über Esperanto geschrieben hatte. Irgendwie passte es also in unsere Sammlung.

Jetzt aber erhielt ich ein sehr günstiges Angebot und seit dem Frühjahr ist auch eine Taschenbuchausgabe verfügbar (ISBN 978-1781251157). Überdies kann man (sofern man der Lese-Empfehlung folgen will) auch das gesamte Buch kostenfrei aus dem Netzarchiv beziehen oder gleich direkt dort lesen: kurzelinks.de/pdf-scientific-Babel.



Der Autor sagt es uns gleich vorneweg, worum es ihm geht: „Dieses Buch ... ist nicht grundsätzlich ein Buch über Englisch. Es geht um die Geschichte der wissenschaftlichen Sprachen, die Menge der Sprachen, durch die wissenschaftliche Erkenntnisse produziert und kommuniziert wurden.“ (S. 1). „Ich bin gewiss nicht der Ansicht, es gäbe Sprachen, die schon in sich wissenschaftlicher daherkommen als andere (obwohl das einige für sich reklamierten und auch heute noch reklamieren, wie wir sehen werden)“ (S. 2-3) – und er schränkt den Begriff Wissenschaft ein. Er will ihn in ganz engem Sinne auf die Eliten der Naturwissenschaft fokussieren, die sich nur um die harten Fakten kümmert und im inneren Zirkel der Forscher unter sich bleibt. Außen vor bleiben dabei selbst die Medizin und die angewandten Wissenschaften wie Ingenieurwesen oder Agronomie, erst recht aber die Geisteswissenschaften, weil solche Fächer viel stärker auf die Muttersprachen verwiesen sind. Übrig bleiben also Physik, Chemie, Biologie und Mathematik.

So befasst er sich mit den Sprachbarrieren in der Wissenschaft, von einem interdisziplinären Blickwinkel aus; denn nicht ein Linguist ist hier am Werk, sondern ein Historiker, der seine Untersuchung gewissermaßen anlegt als eine Reise durch die

